

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

## XVIII CONGRÉS CATALÀ D'ESPERANTO

30-31 de maig - 1 de juny

# 1936

## MANRESA

SEPTEMBRO-OKTOBRO 1935

N-ROJ 220-221

Hi ha una manera indirecta de protegir la  
**FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA:**  
Comprar les coses que ella patrocina.

## **Kataluna Antologio**

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

## **Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto**

Edició de 4.000 llibrets al preu de 25 cèntims exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20<sup>o</sup> /<sub>o</sub> de descompte.

## **Zamenhof-disko**

Disc fonogràfic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.<sup>e</sup> Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona 1909. L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'esperanto. (Esgòtat)

## **Curs Complet de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto**

per Jaume Grau Casas. Gramàtica i Vocabulari Esperanto-Català, 170 pàgines. Preu: 3'50 ptes. Descomptes als grups i revenedors.

Adreceu-vos a

CARRER VALENCIA, 245

BARCELONA



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj  
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

## POST RIPOLL, MANRESA

La Komitato de KEF, post la Kongreso de Ripoll, pristudis la diversajn eblecojn por la Kataluna Esperanto-Kongreso de 1936, kaj decidis akcepti la oficialan inviton de «Bela Espero» el Manreso, kies laborado por esperanto depost longa tempo estas plena garantio pri la rezultato de nia proksima festo.

La rekomendojn de la Kongreso por Tarragona kaj Puigcerdà ni devis meti flanken. En Tarragona nia movado bedaŭrinde havas tre malmultajn subtenantojn, kiuj ne kuraĝas preni sur sin la organizan taskon; almenaŭ por 1936. La necesajn klopodojn oni faros por 1937 aŭ 38. Puigcerdà sidas proksime de Ripoll kaj malproksime de ĉiuj ceteraj esperantistaj kampoj: tial ĝi ne prezentis grandan ŝancon de sukceso. Tiu bela urbeto en la Cerdanya valo, en la centro de la Pirenea regiono, estu la celo por alia jaro.

La malfruiĝo de tiu ĉi numero estas kaŭzita de la klopodoj faritaj por la organizo de nia proksima Kongreso. Ni ne volis kaŭzi malutilon al la Floraj Ludoj, kies Alvoko devas atingi kiel eble plej baldaŭ la esperantistan publikon, precipe la amantojn de la internacie konata literatura konkurso.

La dato de nia Kongreso de 1936 estas 30-31 de majo kaj 1 de junio. La loka Kongresa Komitato ne estas elektita an-

koraŭ de la Grupo. Pri tiuj detaloj ni havos tempon paroli en niaj proksimaj numeroj.

Intertempe ĝiuj niaj amikoj povas havi la certecon, ke nia movado ne havos interrompon. La diversajn punktojn tuŝitajn dum la lasta Kongreso ni iom post iom disvolvos, sen granda bruo, sed kun firmaj paŝoj. Per nia konstanta laborado ni volas pagi la ĝiuf flankan kunhelpon, kiun en la lasta tempo ni ricevis.

Nun vi povas komenci propagandon por la Kongreso de 1936 kaj se vi daŭrigos kun la entuziasmo, kiun vi elpruvigis nun, nia XXVIII en Manresa estos nova grandega sukceso.

## RAPORTO PRI LA LABORAJ KUNSIDOJ de la XVII KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO

En la urbodomo de Ripoll, la 9-an de junio 1935, je la 17-a. Prezidas Sro. Sebastià Alberic kaj protokoladas Sro. Rafael Gisbert. Ĉeestas 65 gekongresanoj.

La sekretario legas la raporton pri la lasta ĝenerala kunsido de KEF., kaj la kasisto Sro. Josep Coll., tiun pri la financoj. Ambaŭ raportojn oni aprobas.

Sro. Joan Gili proponas, ke la Kongreso esprimu sian dankon al Sro. Saldanha Carreira, prezidanto de la XVI Internaciaj Floraj Ludoj, pro lia multvalora kunlaborado. Aprobita.

Sro. Rafael Gisbert legas la Jaran Raporton al la Kongreso. Pri ĝi ni donas resumon: Karaj gekongresanoj: Ni volas informi vin pri la tasko disvolvita de la Komitato kaj kun plezuro ni submetas ĝin al la Kongreso, dezirante ke ni estu sciintaj interpreti vin ĉiumomente, tial ke nia Asocio estas esence demokratia kaj ni nur estas viaj mandatplenantoj.

Propagando — Tiun ĉi aspekton de nia disvolvo ni efektivigis kiel eble plej fervore. Ni utiligis la ĵurnalaron sendante al ĝi informojn pri tio, kio koncernas nian movadon; speciale tia propagando multobligis okaze de niaj Kongresoj kaj Floraj Ludoj. Ni daŭrigis nian propagandon per radio, per paroladoj kaj sciigoj pri la esperanto-movado, celante diskonigi la gravecon de nia afero. Bedaŭrinde, fermigis tiu ĉi

pordo en la radio-stacio, kiu estis akceptinta nian kunlaboron. Tiu decido de la stacio ne nur tuŝis nin sed ĉiujn asociojn, kiuj regule uzis la mikrofonon por kulturaj celadoj. Ni ne devas forgesi tiun aspekton de nia propagando kaj devos profiti la plej malgrandan okazon por ĝin renovigi; ĉu laŭ la sama maniero, ĉu kreante novan servon al la radio-stacioj pri io ajn en esperanto. Ni sukcesis, ke la fama fotografisto Sro. Zerkowitz eldonu bildkartojn kun teksto en esperanto. Aperis ĝis nun serioj de Barcelona, Mallorca kaj Tarragona. Sur niaj kovertoj ni presigis en kataluna lingvo la frazon «Esperanto estas la dua lingvo de ĉiuj homoj kaj de ĉiuj popoloj», kiun ni ŝuldas al la inspiro de nia poeto Sro. Jaume Grau Casas. Nian propagandon ni alportis al la festo nomata «Librotago». Ĉe stando instalita de librovendejo Darné sur Rambla de Canaletes en Barcelono, ni havis specialan fakon kun granda propagandafiŝo. Specialan standon ni havis ankaŭ en la Barcelona Foiro, ĉe kies starigo kunlaboris diversaj grupoj. Tiuokaze oni disdonis milojn da flugfolioj. En kulturajn mediojn ni ankaŭ direktas nian agadon. Dank' al tio ni sukcesis altiri al nia movado la gestudentojn de «Escola Normal de Mestres de la Generalitat», ĉe kies altlernejo mem okazas kurso sub la gvido de profesoro Samuel Roca i Rodó. Antaŭ la komenco de la kurso profesoro Delfí Dalmau faris prelegon kun granda sukceso. Ni esperas, ke dum la proksima akademia kurso ni povos daŭrigi tiun taskon pli grandskale ankoraŭ.

**Klarigado de kursoj.** — Krom la dirita ĉe «Escola Normal de Mestres», ni gvidis kursojn en Enciklopedia Akademio Espero kaj Paco kaj Amo. Specialan kurson por profesoroj, sub la gvido de profesoro Delfí Dalmau, ni klarigis en la federacia sidejo. Ni havas nun en preparo leterkurson, kiun ni povos komenci post kelka tempo.

**Universala Esperanto Asocio.** — Laŭ interkonsento de nia antaŭa ĝenerala kunsido okazinta lastan jaron en Barcelona, ĉiuj niaj federacianoj estas membroj de UEA. Nia pozicio en la universala organizo fortikiĝis. KEF havas postenon de Konsilanto kaj pro la pliiĝo de la nombro de niaj membroj ni rajtas nun postenon de Komitatano, pri kies elekto ni parolos poste. Ni ĉiuj havas la moralan devon subteni la universalan organizon, tial ni rekomendas ke ĉiuj fariĝu aktivaj membroj de UEA.

**Eldona Fakoj.** — Kiel vi scias, la «Curs Complet d'Esperanto» jam estas en la libromarkato. Ni havas en preparo la Katalunan Ŝlosilon, kiu espereble povos elveni antaŭ la fino

de la jaro. Por KATALUNA ESPERANTISTO ni propagandis plej intense kun la celo varbi grandan nombron da abonantoj. Kvankam ni parte sukcesis, tio ne sufiĉas por doni al nia organo la amplekson, kiun postulas la multa materialo, kiu atendas publikigon. La Kongreslibro de Ripoll estas eldonita de Sro. Ferran Montserrat. Pri ĝia esperanto-teksto zorgis nia Komitato.

**Akademio** — Nia asocio estas honorigita per la elekto kiel lingvokomitato de nia Prezidanto, Sro. Sebastià Alberic Jofrè.

**Unuiĝo kaj pligrandigo de KEF.** — Unu el la aferoj pri kiuj plej intense ni laboris estis la unuiĝo de ĉiuj esperanto-asocioj de nia lando por la plej efika disvolvo de nia movado, por la plej utila kaj rapida rezultato de nia agado. Ni skribis leterojn, faris vizitojn kaj paroladojn. Aliĝis al KEF en la lasta tempo Esperanto-Grupo Vic, Frateco el Vendrell, Esperanto-Grupo Ripoll, Enciklopedià Akademio Espero el Barcelona kaj Bela Espero el Manresa. Kiel vi vidas niaj vicoj plinombrigi, sed ni bezonas la plenan unuiĝon. Ni ĉiuj senĉese devas propagandi tiun gravegan aferon. Lastan jaron nia KEF havis 171 membrojn kaj nun ĝi kalkulas 320. Esperable tiu progreso estos konstanta, se niaj amikoj helpas nin.

Tiu ĉi raporto, el kiu ni estas devigataj forigi multajn punktojn pro manko de loko, estas varme aprobita de la ĉeestantoj.

Sro. Solà gratulas la Komitaton pro la multflanka laborado kaj speciale la sekretarion pro la raporto.

Sro. Comellas esprimas sian ĝojon pro la elekto de Sro. Alberic kiel lingvokomitato.

Oni elektas Sron. Delfi Dalmau komitatano de UEA.

La prezidanto informas pri la normigo de diplomoj pri Kapableco kaj Profesoreco interkonsente kun la Akademio. La Kongreso elektas la katalunajn lingvokomitatojn por fari eblajn ŝanĝojn en la ekzamenprogramoj sub prezido de profesoro Dalmau.

Sro. Solà estas elektita reprezentanto de KEF en la XXVII Univarsala Kongreso en Roma.

Starigon de delegitoj en tuta Katalunujo oni aprobas post paroladoj de la prezidanto kaj Sro. Comellas.

Oni interkonsentas prezenti proteston al la urbkonsilantaro de Cádiz pro la forigo de la nomo de la majstro de unu tiea strato.

La «Kataluna Ŝlosilo» kaj la «Diccionari Català-Esperanto» estas temoj amplekse pritraktataj de la kongresanoj, vi-

gle partoprenante Sroj. Gili, Comellas, S. Alberic, Roca, Solá, Gisbert kaj Dalmau. Oni aprobas la eldonon de «Kataluna ŝlosilo». Pri la vortaro oni interkonsentas, ke la lingvokomitatoj prenu sur sin la taskon pri ĝi.

Sro. Banet parolas pri la propagando de esperanto ĉe turismo. Sro. Comellas pritraktas ankaŭ la aferon kaj informas pri la agado farita en Vic.

Fermo je 20-a.

Sama loko, la 10-an de junio, je la 11-a. Prezidas Sro. Alberic kaj protokolas Sro. Gisbert. Partoprenas 75 gekongresanoj.

La sekretario legas kelkajn telegramojn kaj leterojn.

Sro. Chaler parolas pri la gramatiko de Sro. Jaume Grau Casas kaj pri la propagando. Amplekse li parolas pri la afero kaj faras valorajn sugestojn. Partoprenas la debaton sinjoroj Serrat, Dalmau kaj Comellas. La prezidanto diras, ke la Komitato danke atentos la faritajn sugestojn. Post paroladoj de Sroj. Grau, Capdevila kaj Gisbert oni aprobas, ke la Komitato faru viglan propagandon por la gramatiko.

La prezidanto faras alvokon al la grupoj, kiuj ne estas en la vicoj de KEF. Aludas la malaltan kotizon, atentigas pri la avantaĝoj de komuna agado, kiu donus al ni rapidan sukceson en Katalunujo kaj al la katalunaj geesperantistoj grandan moralan valoron antaŭ la tutmonda movado; li finas rilatante speciale al la statuto de KEF, kiu estas tre demokratia kaj ĉiam permesas la regadon de la Federacio laŭ la vidpunkto de la plimulto: ĉiuj povas estri KEF.

La prezidanto prezentas polan samideanon, Sron. Prabucki. Tiu ĉi salutas kaj kun entuziasmo proponas sian servon al esperanto dum sia ebla restado.

Oni parolas pri la kongresurbo de 1936. Unuj parolas pri Tarragona. Sro. Chaler pledas por Puigcerdà. Ĉiuj defendas sian vidpunkton. Sro. Comellas diras, ke la kongresoj devus daŭri nur du tagojn por ke la kongresanoj povu ĉeesti ĉiujn farojn. Oni rajtigas la Komitaton, ke ĝi elektu la kongresurbon konsiderante la eblecojn de la proponoj.

Sro. Dalmau proponas aplaŭdadon al la Kongresa Komitato de Ripoll pro ĝia laŭdinda agado. Sro. Planes dankas kaj petas, ke tiu estimpruvo estu dediĉata al la belaj kaj ĝentilaj Reĝino kaj korteganinoj de la Internaciaj Floraj Ludoj. Responde al tiuj ĉi vortoj longa aplaŭdado sonas en la plena salono, kiu ne povas enhavi la multegajn kongresanojn, kiuj iom post iom amasiĝis en la Urbdomo.

Laŭ propono de Sro. Grau oni aprobas reciproki la saluton, kiun Sro. Mangada alportis de Sro. Lluís Companys kaj ekskonsilantoj de «Generalitat de Catalunya».

La prezidanto proponas dankesprimon al Sro. Montserrat pro la eldono de la Kongreslibro.

Oni pritraktas la elekton de la nova komitato. Aklame oni aprobas la liston donitan en nia lasta numero.

La prezidanto dankas ĉiujn gekongresanojn, speciale gesinjorojn Mangada kaj ilian filon, el Madrido, kaj la gesamideanojn el Toulouse, precipe fraŭlinon Castel; kaj dezirante feliĉan reveturon al la hejmo li esprimas la esperon, ke ĉiuj kun sama fervoro partoprenos la proksiman kongreson.

Kun entuziasmo oni kantas la strofojn de La Espero.

Fino je la 13.15.

*La protokolinto,*

RAFAEL GISBERT GARCIA

## ALVOKO POR LA XVII INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Kies solena festo okazos kun la XVIII Kongreso de K. E. F. Al vi, Esperantaj verkistoj, inspiruloj el ĉiuj landoj, saluton! kaj inviton partopreni la jenajn konkursojn:

### ORDINARAJ TEMOJ

#### *Originalaj tekstoj*

I.—Versaĵo kantanta *Amon*.

II.—Proza *Ama* verkaĵo.

#### *Tradukitaj tekstoj*

I.—Esperantigo de la jena kataluna versaĵo:

### EN LA CRUÏLLA

Jo camino vida enfora,  
vós, amiga, vida endins.  
La meva ànima us saluda  
en la creu de dos camins.



Vostre somni és d'unes ombres  
que potser vindran demà;  
d'altres ombres jo somnio  
que mai més podran tornar.

M'han amat ulls com els vostres  
llavis gerds i braços fins...  
si ens paréssim una mica  
en la creu de dos camins?

Quin silenci! Respirem-lo.  
Poc a poc el jorn s'ha fos.  
Que divina és la tenebra  
per als somnis de tots dos!

¿No veieu mos ulls que lluen  
si mon cos és decandit?  
Esperem en el silenci  
fins sentir-hi un dolç cruixit:

per a mi la fulla seca  
que en el vent s'ha esmaperdut;  
per a vós la passa fina  
de l'amant inconegut.

JOSEP CARNER

II.—Esperantigo de la jena kataluna prozaĵo:

### TRASPUAMENT DE LLUM

Un matí de març jo anava en tren per la Riviera. Era molt de matí. Clarejava difícilment. El cel era cobert. La florida dels fruiterars semblava de paper. Hauríeu dit que la mar era oliosa. La broma s'estava, tota encantada, damunt les muntanyoles. Per les petites ciutats, hom veia passar cares opaques, espatlles deprimides. Pobra gent! Era un d'aquells matins que, abans de rentar-vos, us atureu una estona, amb un aire pensívol, a mirar la ribella. I no és que penseu en res. Però us manca una empena. A tota la terra li mancava una empena. L'emascara de fum que feia un vapor a l'horitzó, durava, durava. La columneta de fum dels petits masos, perduts entre les oliveres, no es desfeia gens. De tard en tard piulava algun ocell: piulava una mica i després s'aturava en

un branquilló, poc convençut. Alguna dona, feta un garbuix, mirava a la finestra. La miràveu, i no us corresponia ni prenia un fals aire dissimulat: badallava.

Ni una esperança que s'atenués la grisor feixuga del cel! El món, atediat o caduc, li enviava misteriosos afluents. Envers ella anaven el fum escanyolit dels masets i l'enorme encenall del fum dels vapors. Les bromes li feien de fonaments massissos damunt la roca. Grisos devien ésser, encara que subtilment, el baf estantís de les coses i l'alè dels homes que s'havien llevat d'esma, com la mar era d'un gris apegalós, i, en terra, els caminets cendrejaven.

Vaig deixar el corredor del vagó. Volia seure. Estava tot sol en el meu compartiment. Vaig resoldre d'abandonar-me, una mica estòlid, com si em trobés en un llit de sanatori. Els meus ulls s'aclucaven. Jo pensava: —Hom veu que totes les coses han enviat llurs encisos a adobar o a repintar.—I se m'acudien memòries de dies semblants o de situacions morals semblants. Dies que certs versos immortals ens semblaven buits. Dies del nostre prometatge que deïem: —Com Mare de Déu ens hem arribat a prometre?—Dies que següem el mecanisme de la nostra vida amb aquella tristesa desemparada i tàcita que us produeix de vegades el menú invariable d'una casa de dispeses.

Alguna cosa, però, va ungir-me les parpelles amb una mena de renovellament. Vaig obrir els ulls: la llum insinuava una carícia groga. Vaig saltar de nou al corredor.

Quina trasmudança! A l'Orient, a una certa altura, l'escalonament de núvols obtusos, immobilitat arrufats, s'havia convertit en una mena de cova màgica. El seu brancal, el seu llindar, el seu sostre, eren de glaços lluents i degotants. Però les gotes no eren sinó de llum. Aquells glaços anaven prenent, cada vegada amb més intensitat, el color de la flor de la ginesta. I quan més es dauraven, més regaladissos eren. Hom comprenia que dins aquella cova de glaç s'hi calava foc. Era la fantasmagoria brillant d'algun Ariel benefactor. I passat el primer enlluernament, vaig mirar al meu volt. Era daurat el fum dels masos, era daurat l'enorme encenall del vaixell, a l'horitzó; els caminets eren plens de tiges i de pedres que lluien, la broma de les muntanyoles s'acoloria, la mar era un pa d'or, les cares de la gent semblaven dolces, i secretament exaltades. La terra, els aires, la mar enviaven a la cova magnífica llurs afluents de llum. Soltadament, les fulles es movien, els carrers de la ciutat eren alegres, les oliveres som-

reien, els rams gairebé negres de la palmera tornaven a tenir un posat d'ales.

Després, la cortina dels núvols va tornar-se a cloure. El sol, aquell dia no havia volgut sinó traspuar magníficament. Però aquell traspuar havia estat fins i tot més excitant que no una presència declarada. Sabíem que no era mort; no era més que retirat en el seu laboratori, a preparar els miracles nous de la primavera. Acabava de perfilar els desigs i les esperances. Dava l'últim toc als poetes. Acabava d'ensinistrar les orenetes i de calcular quants de milions de roses faria florir en un sol dia.

Hom havia fet un paper ridícul. L'ensopiment ens el fa fer sempre, un paper ridícul. Quan el sentim, ens sembla que anem d'acord amb la naturalesa, o l'ambient, o el fat històric. Flet i fet, l'ensopiment només està en nosaltres. L'aparent opacitat de la vida no és sinó un truc per dar més valor a la sorpresa imminent. Però el truc ens enganya. I per això és clàssic que la felicitat ens trobi sempre fent cara d'enzes.

JOSEP CARNER

*Eksterordinaraj temoj*

I.—Premio de la Komitato de KEF, 50 pesetoj. Temo: «Laŭvola».

II.—Premio de la Prezidanto de KEF, 50 pesetoj. Temo: «Laŭvola».

III.—Premio de KATALUNA ESPERANTISTO. Dumviva abono al la gazeto. Temo: «Laŭvola».

En la sekvantaj numeroj de nia gazeto ni daŭrigos la liston de Eksterordinaraj Temoj, por kiuj estas promesitaj multaj premioj. Ni ne povis prokrasti la Alvokon al la Floraj Ludoj, por doni pli multe da tempo al ĉiuj amikoj de niaj konkursoj. Jen la kialo de tiel nekompleta listo.

Inspiriĝu kaj verku por la gloro de nia Literaturo!

NOTOJ

I.—La aŭtoroj de la du premiitaj Originalaj tekstoj I-II, kaj tiuj de la du premiitaj Tradukitaj tekstoj I-II, ricevos ekzempleron de la verko «Kataluna Antologio», de Jaume Grau Casas. Krom tio estos donacata al ĉiu laŭreato atesta diplomo.

II.—Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti reĝinon de la Festo.

III.—La verkoj konkursontaj devas esti verkitaj en bona Esperanto, kaj ne ankoraŭ eldonitaj aŭ anoncitaj.

IV.—La soleno de la XVII<sup>a</sup>j Floraj Ludoj okazos en Manresa dum la XVIII Kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio».

V.—La manuskriptoj, kiuj portos surskribitan devizon, devas esti ricevitaj antaŭ la 15 aprilo de 1936 ĉe la Kataluna Esperantista Federacio, carrer València, 245, Barcelona, akompanataj de fermita koverto, kiu surhavas la saman devizon kaj entenos karton kun la nomo kaj adreso de la verkinto.

VI.—La manuskriptoj ne estos resendataj eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj. Ĉiu sendinto bonvolu konservi kopion de la manuskriptoj. La manuskriptoj devas esti skribitaj plej legeble sur unu flanko (paĝo) de ĉiu paperfolio. Oni menciigu ĉiam ĉu la verko estas originala aŭ la lingvon el kiu oni tradukis. La paperfolioj de ĉiu konkursaĵo estu centimetre nek pli ol 30×20 nek malpli ol 20×15.

VII.—La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu konkurso.

VIII.—La Komitato publikigos la verdikton, per KATALUNA ESPERANTISTO kaj per la esperantaj kaj katalunaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represi.

IX.—La verkoj premiitaj fariĝos propraĵo dum unu jaro, de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur KATALUNA ESPERANTISTO aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti de la Redakcio de K. E.

X.—Eventuala aljuĝo de «Subpremioj» nur signifas honoran mencion sen rajto al efektiva premio.

*Peto al la gazetoj.*—Ni petas niajn kolegojn, ke ili publikigu nian alvokon por ke la konkurson partoprenu esperantistoj el la tuta mondo.

**Fred. Pujulà i Vallès, prezidanto; S. Alberic Jofrè, Joan Gili Norta, Samuel Roca i Rodó; Eduard Capdevila, sekretario.**

## XXVII<sup>a</sup> UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kvankam tiu ĉi Kongreso estis nomata la Kongreso en Romo, fakte ĝi okazis en tri urboj: Florenco, Romo kaj Napoli. Malmultaj katalunoj ĝin ĉeestis malgraŭ la proksimeco de la lando; ses katalunajn kongresanojn ni rimarkis en Romo. Ni ekveturis la 1<sup>a</sup>n de Aŭgusto el Barcelono rekte al Genova kaj de tie, post tranokto, al Florenco kie la Kongreso efektive komenciĝis. La programo anoncis la malfermon de la somera universitato por la tria horo posttagmeze; alveninte matene ni havis tempon admiri la pentraĵojn de Boticelli Fra Angelico k. t. p., kaj la malnovajn romajn skulptaĵojn, el kiuj konsistas la fama Galleria degli Uffici. Je la tria ni estas pretaj por la unua kunveno de la Kongreso: Malfermo de la somera universitato: Parolado pri Dante. Tre bone! Sed pri la ejo, kie tio okazos, la programo bedaŭrinde silentas; ni demandas al la multaj gastoj, kiuj troviĝas en la salono de nia hotelo, neniuj scias pri tio. Fine ni eliras en la straton kaj vidas grupon de samideanoj, kiuj decide paŝas en unu direkto, ni fidas al ili sendemande kaj post longa irado ni alvenas antaŭ domo, kie flirtas la verda standardo. La salono estas jam tute plena kaj ni kun multaj aliaj devas stari. Sub la prezido de reprezentanto de la urbestro alparolas la publikon kaj malfermas la someran universitaton. Doktoro Canuto el Torino, kaj la paroladon pri Dante faras, anstataŭ Dro. Kalocsay, la tradukinto de la Infero, la poeto Julio Baghy. Post la parolado ĝoje estas interparoli kun la malnovaj konatoj, kun kiuj dum unu semajno oni havos okazon denove renkontiĝi.

La urbestro de Florenco akceptis la kongresanojn en la vastega halo de la fama palaco kaj riĉe ilin regalis. Poste per aŭtobusoj oni, tro rapide, vizitis la urbon; krom tio la varmo estis sufiĉe intensa por iom malagrabligi la viziton; ankaŭ iom da malordo en la aŭtobusoj estis kaŭzo de puŝado kaj ĝeno.

### AL ROMO

Dum la tuta Kongreso oni suferis ĉiam de manko de informado. La programo anoncis la ekveturon al Romo per speciala vagonaro je la 9 1/2 matene. Vespere ŝajne en la in-

terkonatiĝa vespero, kiun mi ne ĉeestis, oni sciigis ke la vagonaro forveturos pli frue. Dimanĉon matene, 4<sup>a</sup>n de aŭgusto, menion sciante pri ŝanĝo, ni vizitis la faman katedralon kaj nin turnis je la oka al la hotelo por matenmanĝo. Tie oni diris al ni: vi havas tempon nur por rapidi al la stacidomo ĉar la speciala vagonaro forveturas tuj. Ni do rapidas kaj kiam ni alvenas al la stacidomo la vagonaro estas tute plena kaj ni devas rifuĝi en la restoracio-vagono por trovi sidlokon: taŭga loko ni pensis por matenmanĝo. Ni do sukcesis matenmanĝi je la naŭa kaj duono, sed post unu horkvarono oni anoncas al ni ke ĉar ni jam sidas en la restoracio ni devas tagmanĝi je la deka. Post la tro frua tagmanĝo ni eliras el la vagono kaj sukcesas sidiĝi en la kupeoj de tiuj personoj, kiuj nun okupas sian lokon en la restoracio.

Fine je la dua posttagmeze ni atingas Romon. Kiam la suno ne estas tiel arda la aŭtobusoj venas al la hoteloj kaj prenas la kongresanojn por rapida travizito de la mirinda urbo: impresas ĉiam la granda riĉeco de la marmoraĵoj, la oro, la ĝardenoj kaj la ruinoj de tiu eterna urbo Romo.

Lundo, 5an de aŭgusto.

Matene la aŭtobusoj prenas nin antaŭ la respektivaj hoteloj kaj nin kondukas al la Vatikano. Ni admiras la kolonaron de la fama placo de Sankta Petro kaj la preĝejon de la sama nomo, la plej vastan kaj riĉan en la mondo. Ni ne havas tempon por viziti la muzeon, la plej interesan en la urbo kaj promesas reveni antaŭ la forveturo.

Rapide al Aŭgusteum, kie je la 11<sup>a</sup> matene okazas la Solena Malfermo de la XXVII Kongreso. La kongresanoj rapide plenigas la vastan salonon, konstruitan apud la tombo de imperiestro Aŭgusto, kaj je la ĝusta horo la aŭtoritatoj kaj esperantistaj eminentuloj eniras la estradon. S-ro. Vicministro de Edukado malfermas la Kongreson kaj tuj poste sinjoro Malmgrem, kiel prezidinto de la lasta Kongreso en Stockholmo proponas la estraron por la nuna Kongreso; mi ne citos ĉiujn nomojn, kiujn cetere vi legos en la oficialaj raportoj, mi diros nur ke S-ro. Stefano La Colla estis elektata kiel prezidanto. Tuj poste li faris sian paroladon kaj salutis kaj bonvenigis la eksterlandajn gastojn. Leviĝis S-ro. Bastien, prezidanto de U. E. A. kaj faris kuraĝigan paroladon por plifervorigi la samideanojn; la paroladon interrompis sufiĉe ofte la fotografistoj por fari bildojn el la ĉeestantoj. Fulmo post fulmo blindigis tre ofte niajn okulojn.

Sekvis poste la kutima kaj longa salutado de la naciaj delegitoj; mi mem tion faris en la nomo de la katalunaj esperantistoj. En la fino de la kunveno militista muzikistaro ludis la Esperon, kiun kunkantis la kongresanaro.

Posttagmeze okazis fakaj kunsidoj kaj diversaj laŭvolaj ekskursoj: al Frascati, al katakomboj k. t. p. En ĉiuj stratoj de Romo oni renkontis la esperantistojn.

Vespere en teatro oni ludis faman teatraĵon de Goldoni tradukitan al Esperanto: la aktoroj estis amatoroj, kvankam sub la direkto de Baghy, profesia aktoro. Ili bone ludis kaj kolektis en la fino multe da aplaŭdado. Domaĝe ke la prezentado ne okazis en libera aero ĉar oni multe ŝvitis en la salono.

Mardo, 6.an de aŭgusto.

Matene oni kondukis nin al la malnovaj ruinoj de Romo: la kongresanoj vizitis la vastan imperiestran Coliseum, la plej elokventan rememoraĵon de la malnova urbo kaj tuj poste la ruinojn de la Romaj Forumoj kun iliaj Triumfaj arkoj. Granda nova strato anstataŭas nun la nevalorajn domojn, kiuj kaŝis kaj malbeligis la ruinojn. En la supro de monteto, sub la ombro de arboj de bela ĝardeno, kolektiĝis iom post iom la kongresanaro por aŭskulti la paroladon pri la ruinoj de Romo, kiun elokvente faris per helpo de megafonoj S-ro. Migliorini. La priskribo de la historiaj okazintaĵoj valorigis antaŭ la okuloj de ĉiuj la vidaĵon etendiĝantan antaŭ ni.

Posttagmeze okazis diversaj fakaj kunsidoj en la Universitato, ejo de la Kongreso. Ĉar multaj okazis samtempe estis ne eble ĉiujn ĉeesti. Kiel plej interesan mi vizitis la kunsidon de la Lingva Komitato. Ĉar lingvakomitatoj ne troviĝis en granda nombro ni ne povis alpreni decidojn, sed deziresprimojn: la plej grava estis tiu ke la kunsidantoj rekomendas ne plu oficialigi vortojn dum intertempo de almenaŭ kvin jaroj. Post la kunsido mi vizitis la Akceptejon, kie laboris afable kaj vigle la italaj samideanoj.

Vespere en la teatro okazis literatura vespero, kiun ni ne ĉeestis ĉar la varmo de la antaŭa vespero timigis nin.

Merkredo, 7.an de aŭgusto.

Matene okazis la kunsido de U. E. A., do en la nuna organizacio, kunsido de la Kongreso. Ne multaj kongresanoj ĝin aliris; ĉu pro tio ke ili jam sufiĉe fidis al la esperantistaj pioniroj aŭ tial ke ili deziras viziti la urbegon, kiun altiras ilin pli multe ol la esperantaj diskutadoj, kelkafoje disputadoj? La

fakto estas, ke ĉar la kongresoj nun ne povas alpreni rezoluciojn, mankas intereso por la kunsidoj. Krome Romo estas vasta kaj interesege urbo, kvar tagoj estas malmulte da tempo kaj la kongresano volas ĉion vidi: ĉu al li estos eble reveni iam en la malnova ĉefurbo de la mondo? Cetere dum la tuta mateno mi aŭdis nur plendojn kontraŭ la estraro kaj pri la plendantoj mi ĉiam pensis ke ili tute forgesas ke la estraranoj laboras bonvole, aktive kaj senpage por la movado. Kritiko estas ĉiam la plej facila afero, oni riskas nenion. Laboro estas pli malfacila. Oratoro plendis ke U. E. A. havas pagatajn oficistojn, mi nur bedaŭras ke ni povas pagi malmultajn. Alia pretendis, ke se oni aŭskultos lin kaj sekvos liajn konsilojn, li havas du mil aliĝojn en sia poŝo. Trograndigo mi pensas estas ĉiam malutila.

Sekvis rapida vizito al la Vatikana Muzeo kaj Biblioteko. La fama Sikstina Kapelo estis tre vizitata de la samideanoj.

Vespere okazis en Lido de Roma la internacia balo. Multe da naciaj kostumoj estis vidataj. Oni devas bedaŭri ke inter ili mankis la kataluna kostumo. Ĝis noktomezo daŭris la balo antaŭ la maro kun malvarmeta vento; rapide ĉiuj revenis al Romo per la elektra vagonaro. Dudek-kvin kilometroj apartigas la marbordon de Romo.

Ĵaŭdo, 8.an de aŭgusto.

Per speciala vagonaro la kongresanoj forveturis al Napoli tagmeze. Ni pro la varmo kaj la malagrabla sperto pri speciala, preferis ordinaran vagonaron, kiu forveturis frumatene. Ankaŭ tie la aŭtobusoj prenis nin en la hoteloj kaj faris rondiradon tra la granda urbo; ni admiris la belan golfon kun la blua maro kaj la imponan fumantan vulkanon, Vesubo.

Vendredo, 9.an de aŭgusto.

Matene elektra vagonaro kondukis la kongresanojn al la ruinoj de Pompei, la malnova elfosita urbo, kiun antaŭ du mil jaroj la vulkano enterigis. Tre interesa estis traizado de la malvastaj stratoj kaj ankoraŭ pli la eniro en kelkajn el la belaj loĝejoj kun ilia centra korto, kun murpentraĵoj tiel artaj kaj belaj skulptaĵoj kaj mozaikoj. La fotografaparatoj ne ĉesis preni bildojn. La malgranda muzeo kun restaĵoj de la loĝantoj kaj precipe la ŝtonigintaj kadavroj de la Pompeanoj vekis grandan intereson.

Post la vizito al Pompei ni iris per ŝnurvagono al la supro de Vusuvo, kie oni povas ĝui vastan kaj belan vidon super la



golfo kaj precipe atingi la grandan krateron, kiu estas tute kovrita de lafo kaj sulfuro; multaj ne kontentiĝis per tiu jam impona vidaĵo sed per helpo de pretaj gvidistoj marŝis ĝis la malgranda kratero, kiu troviĝas en la centro kaj de kie elŝprucas ĉiam senhalte fumo kaj sulfurvaporoj.

Sabato, 10. an de aŭgusto.

Matene okazis per tri ŝipoj la ekskurso al la bela insulo Capri, kiun oni atingas per du horoj da veturado. La pejzaĝo estas tre simila al nia en Mallorca. En Capri oni tagmangiĝis kaj tuj poste oni veturis al la blua groto kaj de tie ree al Napoli. La ekskurso estis tro rapide aranĝata; ne estis tempo por viziti la insulon sed nur la mangiĉambron.

Reveninte en Napoli okazis la akcepto en la urbodomo kaj la ferma kunsido de la Kongreso. Vespere ni vizitis la samideanojn, kiuj sur la ŝipo Sinaia entreprenis la krozadon al Afriko. La verda standardo flirtis en la supro de la ŝipo kaj agrabla babilado kaj kantoj aŭdiĝis sur la ferdeko. Estas domage ke la Loka Komitato ne sukcesis trovi por la krozado pli modernan kaj komfortan ŝipon. Je la tria matene la Sinaia forveturis al Sicilio kaj Afriko. Ĉar ni ne partoprenis la krozadon, mi nenion povas diri pri ĝi.

La Kongreso estis finita; ni tranoktis ankoraŭ en Napoli kaj la sekvantan matenon ni entreprenis la revenvojaĝon.

La Kongreso estis bela kaj precipe necesa laŭ propaganda vidpunkto ĉar en suda Italujo troviĝas ankoraŭ malmultaj esperantistoj. Certe la nombro de la kongresanoj efikos, ke multaj personoj, kiuj neniam aŭdis pri esperanto, komprenos ĝian signifon kaj gravecon.

La italaj samideanoj, ĉar unuafoje okazis internacia Kongreso en ilia lando, volis tro multe montri al ni kaj tio devigis al tiu nova aranĝo, ke la Kongreso okazas jen en tiu urbo, jen en tiu alia; la afero estas iomete laciga ĉar oni ĉiutage devas ŝanĝi pri loĝejo kaj tro multe atenti la valizojn. Krom tio la intereso pri la urboj vizitataj estas granda kaj la kongresanoj malzorgas la kunsidojn, do la Kongreson mem. Unuvorte la Kongreso fariĝis tro intense turisma aranĝo, per Esperanto kompreneble; eble en Italujo ĝi nepre devis alpreni tiun karakteron, sed oni povis lasi la viziton al Napoli kaj al Florenco al postkongresaj ekskursoj. Kiel konkludon mi pensas, ke estas pli bone reveni al la antaŭa formo de la kongresoj: tio estas, la sidejo de la Kongreso en unu urbo, la vizito de la lando post la Kongreso mem.

Tiu riproĉeto neniel malgrandigas nian dankon al la italaj samideanoj, kiuj faris sian eblon por konigi al ni sian belegan landon kaj ni komprenas certe la senlacan taskon, kiun ili prenis sur sin aranĝante la Kongreson en urboj, kie ili mem ne loĝis.

MARIAN SOLA

## BIBLIOGRAFIO

Al Torento. — Stellan Engholm: Dua eldono. Ĉe Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. I. 96 paĝ. Prezo: broŝ. sved., kr. 1:20. (=1 svisa franko).

La esperanta debutromano de la sveda verkisto Stellan Engholm vekis siatempe tre grandan intereson tiel pro la temo pritraktita kiel pro la bela lingvaĵo. La unua eldono baldaŭ elĉerpigis; la oftaj demandoj pri la libro atestis ke ĝi estas tre ŝatata, kaj nun aperis dua eldono, malofta okazaĵo je libro originale verkita en Esperanto.

La aŭtoro ĉerpis la temon de sia romano el la kampara vivo lin ĉirkaŭanta. Serene li rakontas pri la vivo de la laboristoj ĉe la uzino, iliaj intereso, zorgoj kaj revoj. Amhistorio de du ĝejunuloj formas la ruĝan fadenon kaj tenas la intereson de la leganto ĝis la fino.

La nova eldono prezentigas en bela eksteraĵo kaj presita sur bona papero, kiel ĉiuj libroj eldonitaj de la sveda esperanto-eldonejo.

La Rondo, esperantista danco de Rafael Tudó kun harmonio de Leopold Botey. Reeldonita de Iberia Esperanto-Servo. Provença, 75, Barcelona. Prezo: 1 pto.

Luksa broŝureto kun desegnaĵoj priskribanta la internacian dancon, kiun la katalunaj esperantistoj prezentis okaze de la V Kongreso en Barcelona. Tre agrabla helpo por amuzaj grupkunvenoj.

Rezultoj de la unua kvinjarplano, de J. Stalin. Eldonis: EKRELO, Leipzig, 1933.

Intereseĝa broŝuro, 48 paĝa, kiu montras la konsiderindajn rezultojn de la unua kvinjarplano en U. S. S. R. La leganto sentas la sukceson de tiuj kolosaj provoj al socialisma konstruado, malgraŭ la iamaj pesimistaj aŭguroj kaj eĉ kalumnioj en kapitalistaj landoj.

« Esperanto Hispan - Amerika Vortareto », de Jesús Amaya. — Editorial Lumen. — Meksiko, D. F. — Belaspekta libreto enhavanta la vortaron de Esperanto kaj hispanameriklingvan tradukon por ĉiu vorto. Karakterizaĵo de tiu vortareto estas ke la aŭtoro uzis fonetike raciigitan ortografion por la traduklingvo. Efektive laŭ tiu ortografio malaperus la por infanoj kruelaĵo ke *c* havas iun sonon antaŭ *e i* kaj alian antaŭ *a o u* k. t. p. Eĉ en latina lingvo, kaj la hispanamerika lingvo estas nomata latindevena, ne okazis tiu malregulaĵo. Kelkaj lingvoj jam pli-malpli reguligis eĉ oficialigite sian ortografion, ekzemple la rusa kaj la turka. En Hispanujo plej eminentaj filologiistoj nome Julio Cesador antaŭ kelkaj jaroj kaj Julio Casares lastatempe publike batalis por raciigo de hispanlingva ortografio, sed senefike ĝis nun.

Bedaŭrinde en la antaŭparolo al la nomita vortareto, Jesús Amaya ne bone uzas la akuzativan finaĵon en Esperanto, precipe kiam temas pri epiteta-predikata diferenco, kaj tial aperas kelkaj eraretoj tiuspecaj. Kompreneble tiu misuzo signifas ke en sia lingvo la aŭtoro ankaŭ ne komprenas tiun gramatikan diferencan. Estas granda malpravo kulpigi Esperanton pro gramatikaj eraroj de esperantistoj. Esperanto, kiel ĉiuj lingvoj, estas komprenebla malgraŭ tiaj eraroj; sed kulpo pro tiuj kaj ĉiuj eraroj ne estas de la lingvoj, sed de iliaj uzantoj. Senpersona lingvo ne ekzistas, samkiel ne ekzistas senpersona arto aŭ metio. Kaj tial lingvo kaj arto respegulas ecojn de la aŭtoroj.—Delfi Dalmau.

Sveda Antologio. Sub ĉefa redakto de Sam. Jansson kaj kunlaboro de pli ol 40 helpantoj. Vol. 1. 228 paĝ. broŝ. sved. kronoj 5:.-, tolebindita 6:50. Ĉe Eld. Soc. Esperanto, Stockholm, 1.

Unu el la plej gravaj taskoj de Esperanto estas prezenti al la tutmondo la kulturtrezorojn kiuj sen Esperanto restus kaŝitaj. Tiu tasko havas la plej grandan signifon por la malgrandaj nacioj, kies lingvoj estas komprenataj de nemultaj homoj ekster la landlimoj.

Ni ĝoje salutis la grandajn kaj gravajn antologiojn: la katalunan, la belgan, la hungaran, la estonan. Nun aperis ankaŭ sveda antologio. Preta estas nur la unua volumo, t. e. la duono de la unua parto. La plano de la tuta verko ampleksas tri partojn: 1-a parto: la tempo 1880-1920. 2-a parto: la tempo ĝis 1880. 3-a parto: la tempo post 1920. Tiu ordo estas elektita pro tio, ke oni deziris unue aperigi la plej interesan

parton, t. e. la verkistojn, kiuj jam famiĝis sed ne malmoderniĝis. La unua volumo prezentas la vaste konatajn aŭtorojn August Strindberg, Gustaf af Geijerstam, Victoria Benediction, Anne Charlotte Leffler, Verner von Heidenstam, Oscar Levvertin kaj Per Hallström.

La tradukoj de tiu antologio estas faritaj laŭ tre demokrata sistemo. Oni povas diri, ke ĝin partoprenis la elito de la sveda esperantistaro. Anstataŭ komisiu la tradukadon al nur unu lerta esperantisto-literaturisto, la ĉefredaktoro de la verko, rektoro Sam. Jansson, laborigis lertajn esperantistojn el la tuta lando. Li elektis kaj tradukigis kaj denove elektis inter la tradukoj, ne por ricevi unuformecon sed por ricevi bonlingvajn kaj sencoplenajn tradukojn. Sekve la antologio spegulas ne nur arton de la verkistoj reprezentataj sed ankaŭ la lingvan nivelon de la sveda esperantistaro nuntempa.

La antologio farita laŭ tiu maniero estas grava atesto ankaŭ pri la taŭgeco de nia lingvo kaj ĝiaj eblecoj plenumi la rolon de internacia lingvo. La prezento de simila antologio en fremda nacia lingvo per tradukoj de enlandanoj estus neebla. La diferenco inter la facileco kaj taŭgeco de Esperanto kaj nacilingvo en rolo de internacia lingvo ankaŭ pli klare vidiĝus, se oni taksas la tempon kaj la penojn kiujn la tradukintoj uzis por lerni Esperanton kaj komparas la rezulton kiun oni atingas samtempe pri la grandaj nacilingvoj.

Enkonduke s-ro. Hj. Beckman, doktoro pri literaturo, skizas la literaturan epokon, kiun ampleksas la volumo, pritraktante la ĉefajn trajtojn de la verkistoj reprezentitaj kaj karakterizante ilin. La tradukaĵoj el la verkoj de Strindberg, la plej granda verkisto sveda (mortinta 1912), okupas la plej grandan lokon sed tiuj de von Heidenstam (nobelpremiito) estas la plej multnombraj.

La preso, papero kaj bindo estas unuaklasaj. La papero estas speciale farita por tiu libro de granda sveda paperuzino. La bindita eldono montras la svedajn kolorojn — bluo kaj oro.

La dua volumo de tiu grava verko baldaŭ sekvos. La Sveda Antologio estos bela pruvo ne nur al la esperantistaro internacia, sed ankaŭ al literaturamaj rondoj svedaj pri la nuntempa signifo de Esperanto. La granda verko estas eldonata sen financa subteno.

Freude durch Esperanto, de la kolekto Volksblatt-Bücherei, edonita de Das Kleine Volksblatt, Wien VII. — Ni konsideras tiun libreton praktika por

instruado de Esperanto. Ĝi estas liberigita de gramatikaj teoriaĵoj, kiuj ĝenerale estas senutilaj kaj malfacile kompreneblaj antaŭ la lerninteco de vivantaj frazoj simplaj kaj tuj uzeblaj. Kontraŭe multaj tiaj frazoj enhavataj en tiu libreto, kun demandoj por ekzercoj, estigas ĝin tre konvena por komencaj kursoj de Esperanto, se la instruanto estas sufiĉe bona por kompreni ke, kiam li instruas komencantojn, li devas agadi pli simile al patro aŭ frato de infanoj, ol la «sinjoro profesoro» de kursanoj. — Delfi Dalmau.

## La XIII<sup>a</sup> Internacia Kongreso de la Pen Klubo en Barcelona

### DISKUTO PRI LINGVOJ

La tedaj tradukoj de paroladoj kaj la fuŝado de naciaj lingvoj fremde parolataj, karakterizis tiun Kongreson de la plej altaj intelektuloj el ĉiuj landoj, okazinta ĉi-jare en Barcelona dank'al organizo de la kataluna Pen Klubo, kiun prezidas la filologo Pompeu Fabra kaj sekretarias la verkisto Millàs-Raurell.

La germano Klaus Mann, filo de la granda verkisto Thomas Mann, kiu pro politikaj cirkonstancoj devas loĝi eksterlande, asertis ke aŭtoro for de la lando de la propra nacia lingvo sentas sin malarmita, malkapabla.

Du aferoj estis ĉefaj temoj por pridiskuto: 1.<sup>a</sup>, libero de verkistoj por esprimado de sentoj k. ideoj; 2.<sup>a</sup>, publikigo de revuo de la Pen Klubo. Pri la unua, la paroladoj estis grandparte malpermesita de la hispana militista cenzuro por la ĵurnaloj. Pri la dua temo starigas al kongresanoj la afero pri lingvoj en la Penklubara revuo: Unuavide tre vulgara facila decido: ĉiuj verkaĵoj estu publikigataj en universala lingvo, kiel la angla aŭ la franca; kaj, kompreneble, tuĵ aperis la problemo: ĉu malakcepti la germanan? k. la problemo: ĉu malakcepti la italan? k. la problemo: ĉu malakcepti la hispanan? k. la problemo: ĉu malakcepti la rusan? k. t. p., k. ŭ. p.; bulgara aŭtoro Balabanoff diris, per pasia parolado, ke slava lingvo devas esti akceptita ĉar pli ol 220 milionoj estas nacioj de slava lingvo. La franca Crémieux respondas, ke ĉiu ja scias

ke rusa estas vaste konata, sed tiu lingvo estas, ĉefe, orienta, kaj la Pen-revuo estas, ĉefe, okcidenta afero. Eble pro tiu aserto de Crémieux, hinda Delegitino, Sophia Wadia, faris, poste, en la sama kunsido, elokventan paroladon por kompreno kaj konatiĝo inter orientanoj kaj okcidentanoj, kiu meritis ĉies aplaŭdon. Intertempe la argentina Delegito, Achával, diris ke la hispana lingvo devas esti akceptata, ĉar ĝi estas ne nur granda lingvo laŭ tradicio, sed ĝi estas la lingvo de la estonto. La kataluna poeto Josep M.<sup>a</sup> de Segarra, jam en antaŭa kunsido, kiam komenciĝis tiu afero pri lingvoj por la Pen-revuo, estis dirinta ke ĉiu aŭtoro dezirus esti kaj estimi kaj esti lingvon kiel universala. Kaj efektive tiel okazis tuj kiam oni devis difini aŭ nomi la lingvojn alprenotajn. Ne nur la cititaj, sed aliaj Delegitoj paroladis por la respektiva nacia lingvo. Fine estas komisiita la flandra Pen Klubo por prezenti specimenon de la efektivigota revuo interkonsente kun Redakcia Komitato.

Mi ankaŭ apartenas al la Kataluna Pen Klubo sed pro tio ke la Kongreso okazis ĝuste fine de majo, kiam mi estas plej firme katenita de mia profesia laboro, mi ne povis ĉeesti tiun Kongreson. Mi estus simple dirinta ke jam antaŭ kelkaj jaroj la hispano José Ortega Gasset skribis «ke ĝenerale estas komediaĵo esprimado per alia lingvo ol la propra», kaj la minimuma komediaĵo estus alpreno de dua lingvo helpa, ĉies kaj nenies. neŭtrala, kaj Esperanto jam pruvis sin taŭga por tio. Ankaŭ mi estus memoriginta enhavon de «L'homme stupide», de Charles Richet, kiu asertas ke homa stultaĵo estas la ĉefa kaŭzo, ke dum estas tiel bona kaj facila solvo kiel Esperanto, homoj diskutas pri lingvoj kaj penas iradi senfinajn vojojn serĉe de solvo, kiun oni vidus per simpla rigardo, per malfertmo de vido kaj bonvolo.

DELFÍ DALMAU

### ADVERTIMENT IMPORTANT

Tots els nostres federats i abonats que no han fet encara la liquidació de llurs quotes, són pregats de fer-ho de seguida per tal de facilitar el desenvolupament normal de la Federació i evitar el trastorn econòmic que llur endarreriment ens podria ocasionar.

Impremta «La Renaixença», Xuclà, 13 - Barcelona

# ***Curs Complet de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto***

per **Jaume Grau Casas**

*La milloz gramàtica en català  
de la llengua, Esperanto. Em-  
pren-la en tots els curssets!*

**Preu: 3'50 pessetes**

*Adrecen-vos a la Redacció de "Kataluna Esperantisto"*

# **Ripoll**

## **Kongreslibro de la XVII Kataluna Esperanto-Kongreso**

**132 paĝoj — 17 × 12**

Teksto en kataluna lingvo kun kelkaj tradukoj kaj priskriboj en esperanto.

Tre belaj bildoj. Alloga enhavo, interesaj informoj pri la kataluna esperanto-movado.

**PREZO: PTOJ. 1.50**

**ELDONIS Iheria Esperanto-Servo**  
str. Provença, 75 - BARCELONA

# ESTATUTS DE LA FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA

Art. 1. L'agrupació general d'esperantistes en terres de llengua catalana, es dirà **FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA**, i, en esperanto, **KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO (K. E. F.)**.

Art. 2. La finalitat de la Federació Esperantista Catalana, és la unió d'entitats i individus esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, i, també, donar compliment als acords i Consells que afectin la collectivitat, procedents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directores de la llengua del doctor Zamenhof.

La Federació Esperantista Catalana, sempre que les circumstàncies econòmiques li ho permetin, s'adherirà, pagant la quota corresponent, a la «Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj».

Art. 3. La Federació Esperantista Catalana estarà integrada de membres actius i protectors.

Per a la classificació dels actius, caldrà tenir en compte el que se segueix:

Els socis actius seran dividits en socis collectius i individuals.

Els socis actius pagaran, per mitjà de l'entitat llur i per cadascun dels socis que aquesta tingui, una quota de 0,30 ptes. trimestrals.

Els socis individuals que acreditin pertànyer a una entitat esperantista, no adherida a la Federació, pagaran solament una quota de 1'20 ptes. anuals.

Els socis individuals pagaran una quota de dues pessetes amb cinquanta cèntims anyals.

Els socis protectors (individus o entitats), pagaran una quota de 12 ptes. anuals com a mínimum (1).

Art. 4. La Federació Esperantista Catalana, estarà regida per una Junta renovable cada any, composta de: President, vice-President, Secretari, vice-Secretari, Caxer, Comptador, Bibliotecari i dos vocals.

Art. 5. La Junta de la Federació Esperantista Catalana convocarà, almenys un cop cada any, si és possible en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, els seus associats en Assemblea o Congrés general, en el qual, previ l'ordre del dia, es donarà compte als federats dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant el temps del seu exercici; serà acordat, si és possible, el lloc on s'haurà de celebrar el pròxim Congrés o Assemblea; seran nomenats els individus que hauran de formar part de la Junta per al següent exercici i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades 30 dies abans del Congrés o Assemblea, i, si és possible, que hagin estat publicades a la revista i incloses en l'ordre del dia.

Art. 6. La Junta permetrà la constitució de seccions dintre de la Federació.

Aquestes seccions, que podran ésser de caràcter ben autònom, hauran de regir-se per un Reglament interior en el qual siguin cedits, com a mínimum, dos càrrecs, en els corresponents Comitès de Secció, al Comitè Directiu de la Federació.

Art. 7. Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria de vots dels socis assistents. Les modificacions que puguin ésser presentades a aquest Reglament, hauran d'ésser-ho amb l'antelació deguda a fi d'incloure-les en l'ordre del dia i estar publicades en la seva totalitat, puix que solament podran ésser dissenyades i estudiades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. 8. Tots els socis actius, individuals o collectius, tindran veu i vot en les Assemblees o Congressos generals on assisteixen.

Art. 9. Aquesta Federació Esperantista Catalana podrà actuar mentre tingui adherides dues entitats o 30 membres individuals. En cas de dissolució, previ acord de la Federació Esperantista Catalana, els fons existents o que resultin de la liquidació, passaran a la «Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado» domiciliada a Ginebra, per a la propaganda de l'Esperanto. Si aquesta entitat central no existia en els moments de la dissolució, podrà, la Junta General de socis, acordar la destinació dels fons i objectes en existència.

Article transitori. La Federació Esperantista Catalana estarà domiciliada a Barcelona, carrer València, 245, entresol.

Barcelona, 6 d'agost del 1930.

(1) Tots els socis pagaran a més ptes. 1'25 anuals per la quota d'U. E. A.